Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Twitter.

443 | Januaro 2018

Ĉu vi ne vidas ĝuste la mesaĝon? Rigardu ĝin en via retumilo.

# tejo:aktuale

## Ĉion bonan al vi por la jaro 2018!

Ni dankas vin, kiuj estis parto de nia agado dum 2017. Ni esperas por ni ĉiuj fruktodonan kaj lernoplenan 2018.
Ĉu vi jam (re)membriĝis por esti membro de TEJO en 2018?
http://tejo.org/membrigu/

---

## Novaĵoj, projektoj kaj esperoj por 2018

Dum la Junulara E-Semajno en Pollando okazis komitatkunsido de TEJO.
Enric Baltasar, Konstanze Schönfeld kaj Charlotte Scherping Larsson parolas pri novaĵoj, projektoj kaj esperoj por 2018.
Vidu la filmeton ĉi tie.



## Por ĉiuj, Esperanto! - Filmeto por la Zamenhofa Tago 2017

Feliĉan **Zamenhofan Tagon 2017**!
Vidu la filmeton ĉi tie.




## Aliĝu al IJK 2018 en Hispanio!

Eblas aliĝi al la **74-a IJK – Internacia Junulara Kongreso** de TEJO!
La evento okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2018 en Badaĥozo (Hispanio).
Aliĝu ĝis la 31-a de januaro por profiti la plej malmultekostan aliĝperiodon.

Por pli da informoj: http://ijk2018.tejo.org/




## Afiŝkonkurso de UNITED: "Restu unuiĝintaj!"

**UNITED** organizas denove afiŝkonkurson, ĉi-foje por sia tutjara kampanjo por kiu la temo estas simple la slogano de UNITED: **“Restu unuiĝintaj”**.

Legu pli ĉi tie.




## Ekkonu novajn volontulojn de TEJO!

TEJO nun havas tri novajn volontulojn, klaku la bildojn por aliri iliajn sinprezentojn:

Paul - Olga - Valia




## Juliana Evandro, nova komisiito pri Landa Agado en Ameriko

Kun granda ĝojo ni povas anonci ke ni havas novan **komisiiton pri Landa Agado en Ameriko**: **Juliana Evandro**!

Legu pli.




## Venontaj Eventoj

- 28-an de Marto - 03-an de Aprilo - Internacia Junulara Festivalo en Marina di Ascea (SA), **Italio**
- 13 - 17-an de Aprilo - Brita kaj Tutkelta Kongreso en Aberystwyth, **Britio**
- 20 - 27an de Aprilo - PRINTEMPaS en la Kastelo Greziljono, **Francio**
- 1 - 5an de Majo - Mirinda Lviv en Lviv, **Ukrainio**
- 14 - 22an de Julio 2018 - Somera Esperanta Studado en Liptovský Mikuláš, **Slovakio**

- 4 - 11an de Aŭgusto 2018 - IJK 2018 en Badajoz, **Hispanio**



### Mirinda Lviv - 2018

Ukrainaj esperantistoj invitas vin viziti la plej mirindan urbon de **Ukrainio**, **komence de majo**!
Pliaj informoj




### Internacia konkurso de poezio por junuloj POEZIO TUT'LIBERA

Poezio tut'libera (Poésie en liberté) estas internacia konkurso de poezio. Ĝis nun estis nur franc-lingve, sed en 2018 estos ankaŭ akceptitaj **esperant-lingvaj poemoj**!
Pliaj informoj

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Gilbert Niyukuri
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Paul Helly, Ariel Palmer

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

*Kopirajto © 2018 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno

INTUIT mailchimp